



La 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj sub aŭspicio de UEA

■ Dima Ŝevĉenko,
Anna Striganova

Baltiaj Esperanto-Tagoj estas tradicia aranĝo, kiu okazas ĉiujare en tri landoj laŭvice: Latvio, Litovio kaj Estonio. Estiĝinte kiel Sovetunia Esperanto-tendaro en 1959, en la 1990-aj ĝi transformiĝis al vere grava internacia aranĝo.

La sekvan fojon, la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55) okazos 6–14 julio 2019 en la urbo Panevėžys, Litovio. La estraro de UEA decidis doni aŭspicion al la aranĝo. UEA jam aŭspiciis kelkajn antaŭajn BET-ojn, kiuj okazis en Litovio: BET-46 en Visaginas (2010), BET-49 en Utena (2013), BET-52 en Birštonas (2016).



Tiujn aranĝojn oni foje duonŝerce nomas “malgrandaj UK-oj”, ĉar ili ja vere iom similas al UK: varia diversspeca programo la tutan semajnon, tuttagaj kaj duontagaj ekskursoj, eldonado de la ĉiutaga “Kongresa Kuriero” ktp. Kutime la koncerta programo estas riĉega, tiel ekzemple dum BET-52 koncertis monde konataj Esperanto-artistoj: Georgo Handzlik, Saša Pilipović, Jomo, Asorti, Mikaelo Bronŝtejn, ĴomArt kaj Nataŝa kaj aliaj. La partoprenantoj ĝuas la etoson preskaŭ 24 horojn diurne, kio donas al BET-oj en Litovio ankaŭ kelkajn trajtojn de la junularaj Esperanto-aranĝoj. Ofte gaja kaj foje distra etoso ne malhelpas al la organizantoj elstare organizi restadon de la gastoj: la loĝbloj estas por ĉiuj gustoj kaj poŝoj, la organizita manĝado abunda kaj varia. BET-oj havas ankaŭ gravan edukadan rolon. Kadre de ili okazas diversnivelaĵoj – de nula nivelo kaj porkomencanta ĝis specialaj kursoj por spertuloj, ekzemple pri la traduka arto aŭ Esperanto-historio kaj Esperanto-literaturo, gvidataj de spertaj esperantistaj instruistoj. La infrastrukturo de la salonoj disponigas bonajn kondiĉojn por prelegoj, seminarioj, rondaj tabloj, koncertoj kaj multo alia.

Tradicie BET-oj en Litovio estas sufiĉe grandaj. En 2019 oni antaŭvidas partoprenon de ĉirkaŭ 300 esperantistoj el dekoj da landoj. La aranĝoj tradicie estas subtenataj de la lokaj aŭtoritatoj, ekzemple en 2016 la Alta

Protektanto de BET-52 estis la ĉefministro de Litovia Respubliko Algirdas Butkevičius kaj en 2013 la Alta Protektanto de BET-49 estis la urbestro de la urbo Utena Alvydas Katinas. Tio tre gravas, ĉar ĝi ne nur praktike helpas en la okazigo de la aranĝo, sed ankaŭ montras al la lokanoj kaj la lokaj amaskomunikiloj, ke Esperanto estas iu afero, kiun indas trakti serioze.



Post la aranĝo estas planata post-BET-a kaj antaŭUK-a ekskurso tra la tri baltaj landoj: Litovio, Latvio, Estonio, kiu finiĝos la 20-an de julio per komuna vojaĝo al la 104-a Universala Kongreso, kiu okazos en Lahtio, Finnlando.

Pliajn informojn pri BET-55 trovu rete: <http://www.esperanto.lt>.